
# Vertikale

Dumonata
periodaĵo
por la aktivuloj
de FEL

Numero 7
Februaro 1995



## Enkonduko

Jen, jam aperas nova numero de Vertikale, kaj eble vi jam rimarkis tion: *dumonata*, almenaŭ, tion mi celas, sed tio grandparte dependas de via kunlaboro, mi nur povas realigi tion, se mi havas sufiĉe da materialo por publikigi. Do, se vi havas novaĵojn pri diversaj okazaĵoj, sendu ilin al mi, adrese la FEL-oficejon. Dankon jam antaŭe.
Notu jam, ke la *Ĝenerala Kunveno* de FEL okazos la 11an de marto, en la Esperanto-domo. Tie la 12an ankaŭ okazos la skribotago de *Amnesty International*.
Ambaŭfoje ĉiu estas bonvena.

Cor van Ekelenburg.

**Flandra Esperanto-Ligo**

**Estraro:**

| | |
|---|---|
| Prezidanto: | *Wim De Smet* |
| Vicprezidanto: | *Alex Humet* |
| Anoj: | *Roland Rotsaert* |
| | *Ivo Durwael* |
| | *Ingrid Lievens* |
| | *Johan Van Eenoo* |

**Oficejo**

La oficejo de FEL troviĝas en Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen. Ĝi estas malferma por la publiko ĉiun labortagon inter la 9a kaj 12a30 kaj inter la 13a30 kaj 17a30. Vizitantoj bonvolu tamen anticipe interkonsenti pri rendevuo.
Telefono (ofichoroj): (03) 234.34.00
Telekopiilo (tagnokte): (03) 233.54.33

La ĝenerala respondeco de la revuo restas ĉe la redaktoro, la verkistoj mem respondecas pri siaj propraj artikoloj aŭ raportoj, kaj la enhavo de ili ne devas kongrui kun la opinio de la redaktoro.

Vertikale, dumonata periodaĵo por la aktivuloj de FEL. Abonoj ĉe FEL.
Numero 7, apero: februaro 1995
Korespondadreso: Vertikale
Cor van Ekelenburg
Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen
Tel.: (03) 234.34.00 (ofichore)

## Antverpeno '95

Same kiel en 1993 kaj 1994 organiziĝos en Antverpeno semajnfino ege ĉeestinda (12a, 13a kaj 14a de majo), ĉifoje ne nur turisma sed ankaŭ gastronomia! Por pliaj informoj vidu la aliĝilon meze de ĉi tiu numero.

ccggghiijjlr.

## Nova Kurso

Sabaton, la 7an de januaro komenciĝis kurso en Turnhout, la unua dum jaroj tie. Ĝi enhavas dufoje dek lecionojn, kaj jam aliĝis dek sep (jes 17) gelernantoj.
La kurso okazas en la monaĥinejo en Kerkstraat 37, Oud-Turnhout, inter la 10a kaj 12a, kaj estas gvidata far...

Cor van Ekelenburg.

## Movado sen Nomo - Kio? Kial? Kiel?

Multaj Esperantistoj konas movado-n sen Nomo, sed samtempe kovas aron da demandoj pri ĝi. Aliaj eĉ ne scias pri ĝia ekzisto.
Movado sen Nomo proponas al la respondeculoj pri la kluba programo por dediĉi unu vesperon al toi ĉi temo. Movado sen Nomo volonte sendos reprezentanton por prizorgi tiun ĉi programon.
Por informoj aŭ interkonsentoj vi telefonu aŭ skribu al la Esperanto-centro.

Ivo Durwael.

**Organigramo**
Ŝanĝoj:

**Grupoj/administrantoj**
**Antverpeno/La Verda Stelo**
Sekretario Lydia Kerremans
Verberdestede 60, 2870 Liezele
Tel.: (03) 899.34.92

Henny De Ketelaere anstataŭas Cor van Ekelenburg kiel administranton.

Aldono:

**Administrantoj-funkciuloj**
Cor van Ekelenburg





## *Enkonduko de la Jarkunveno de "La verda Stelo" far la Prezidanto*

*Karaj Verdstelanoj, karaj amikoj,*

*saluton,*

*Estu bonvenaj hodiaŭ en nia jarkunveno.*
*Pasis denove plena jaro en nia kara Verda Stelo.*
*Bona jaro, mi pensas, kun feliĉe malmulte da malbonaj tagoj. La nura nigra nubo estis la morto, feliĉe je respektinda aĝo, de nia plej malnova membro Blanche Vermuyten. Por la homoj, kiuj konis Blanche restas la perdo granda.*

*Kiam la bonaj spiritoj bonege kunlaboris, estas rerigardi agrabla. La estintan programon ni jam pridiskutis fine de naŭdek kvar, kaj kun ĝojo mi konstatis, ke mi sekvas laŭ vi la ĝustan vojon. Mi kaptas la eblecon realvoki vin al la jena: se vi konas iun, kiu estas bona preleganto, aŭ se vi volus fari ion ajn, kio povus plibonigi la etoson aŭ la kvaliton aŭ aliajn aferojn dum la vendreda kunveno, bonvolu, mi petas, senhezite fari tion. Mi atendas viajn proponojn, kaj sciu, stultaj, malspritaj aŭ naivaj proponoj ne ekzistas laŭ mi, do ne timu, sed proponu.*

*La estraro, kun je unu flanko la spertuloj: Ministro pri Financoj Clara, vicprezidanto Henny kaj Ministro pri Eksterlandaj aferoj Ivo, kaj je la alia flanko niaj freŝbakitaj klakiloj: Lydia, la sekretariino, Cor, ĉionfaranto, do nemalhavebla, kaj mi, bonege kunlaboris. Verajn problemojn ni ne havis, la kunvenoj ĉiam okazis en bona etoso kaj mi pensas, ke mi, sen hiziti, devas diri, ke ni daŭrigos tiun manieron. Se vi havas problemon kun iu aŭ io, vi kompreneble ĉiam povas diri tion, ekzemple se vi volas kontroli la sanstaton de nia en/elspezo, vi nur devas demandi tion al Clara, mi scias, ke neniu afero estas tiel bone en ordo, kiel nia bilanco.*

*Pri la vendredaj kunvenoj, mi volas danki vin pro via ĉeesto, vi komprenas, ke al la preleganto plaĉas, kiel eble plej multe da aŭskultantoj. Prepari bonan prelegon ne estas facilaĵo, la rekompenco ne estas tiuj kelkaj frankoj, kiujn ni nur povas pagi, ne, la entuziasma reago de sufiĉe multaj partoprenantoj valoras multe pli ol la donackarto. Tial mi pensas, ke mi rajtas plendi. Klubo kun pli ol cent okdek membroj meritas, laŭ mi, pli ol la meznombro de dudek partoprenantoj ĉiun semajnon.*
*Jes, mi scias, ke vi ne havas tempon, fakte, homoj kun tempo ne plu ekzistas. Kompreneble ne estas mia afero, ke vi preferas rigardi al "Rad van Fortuin"*

*kvankam mi preferas "De Droomfabriek" tie ĉi en La Verda Stelo. Tamen aŭskultu, ankaŭ tie ĉi vi povas rigardi al "Familie", kaj kia familio!*

*La Verda Stelo-familio, la amikoj, kiuj atendas viajn rakontojn pri kongresegoj, kongresetoj, kie vi estis. Venu kaj rakontu pri viaj travivaĵoj ie en Esperantujo, por ke la homoj, kiuj ne aŭ ne plu povas iri al kongresoj kunĝojas viajn spertojn.*

*Tio, kion mi ĵus diris, falas sub la epiteto "inter krampoj dirite"!*

*La lastan vendredon en naŭdek kvar en amika rondo, mi aŭdis de Ivo kaj Jules, kiel grava La Verda Stelo fakte estas. Mondkonata, unu el la kvin plej gravaj kluboj en la mondo, diris nia kara Honora Prezidanto. Brrr, tiu ĉi scio timigas min iomete, ĉar ĉu graveco ne ankaŭ donas grandegan respondecon al ni?*

*Karaj amikoj, mi tial alvokas vin eĉ pli konvinkite ol pasintan jaron, ke estas ni, kiuj devas montri al la mondo la grandan valoron de la lingvo Esperanto. Ni devas montri kiel grava Esperanto estas rilate al paco, interkompreno, amikeco kaj precipe toleremo.*

*Jes, mi scias, ke en La Verda Stelo ni devas esti neŭtralaj rilate al la religioj, etnoj, naciismoj kaj politikaj aferoj dum la programo, kaj ankaŭ mi volas respekti tiun regulon, sed permesu min atentigi vin pri tiuj homoj, kiuj nuntempe malaprobas nian karan lingvon. Ne la fakto, ke ili malaprobas nian lingvon, sed la fakto, ke tiuj homoj estas la samaj, kiuj kondamnas homojn, kiuj havas malsamajn etnon, nacion aŭ koloron. Mi ne diras, ke ni devas timi tiujn homojn, sed ja iliajn ideojn rasismajn.*

*Mi estas funde konvikita, ke homoj, kiuj ne akceptas aliajn homojn, nur ĉar ili havas malsaman haŭtkoloron aŭ aliajn etnajn devenojn, ne devas ricevi nian simpation, eĉ kiam tiuj homoj propagandas nian patrinan lingvon.*

*Mi scias, ke mi, kiel prezidanto havas certajn devojn al la klubo, al la membroj.*

*Ĉiuj el vi intertempe konas mian filozofian konvinkon, estas tial, ĉar mi finfine estas nur homo, ke mi demandas vian komprenon, kiam mi atakas netoleremecon. Vi devas akcepti, ke mi kun mia tuta spirito kaj koro bataladas kontraŭ milito, maltoleremo kaj rasismo. Se mi ne povas fari tion, mi pensas, ke vi elektis malĝustan prezidanton.*

*Karegaj geamikoj, mi kredas havi la rajton diri tie ĉe libere mian opinion pri tiu ĉi afero, same kiel vi havas la rajton akcepti aŭ rifuzi miajn dirojn.*

*Mi dankas vin pro via atento,*

*Jacques Schram,*
*27an de januaro 1995.*





**Protokoloj de FEL-kunvenoj**

**Komisiono pri la Domo, 94.06.17**

Mardon, la 17an de junio 1994 en la Esperanto-domo.

Ĉeestis: Jacques Schram, Paul Peeraerts, Cor van Ekelenburg, Ivo Durwael.

**Temo:** honorigo de Jules Verstraeten/ fondaĵo refreŝigo de la domo.

**La problemo:** Jacques Schram volas honorigi Jules Verstraeten kaj nomi lin honora prezidanto de La Verda Stelo en la 30a de septembro. Tio ne rilatas al jubileo aŭ al speciala evento. Sed Jules Verstraeten fojfoje plendas pri la "pezo de la jaroj" kaj Jacques Schram volas honorigi lin kiam Jules Verstraeten ankoraŭ bonfartas kaj povos plene ĝui la feston. Li intencas inviti ne nur anojn de La Verda Stelo, sed ankaŭ kiom eble plej multe da homoj el Belgio, kiuj bone konis Jules Verstraeten kaj precipe tiujn, kiuj intime kunlaboris kun li.
Sendube pluraj ŝatus donaci ion kaj petos konsilon.

**Propono:** Ivo Durwael opinias, ke la bonfarto de La Verda Stelo kaj de la Esperanto-centro estas la ĉefaj ambicioj de Jules Verstraeten. Li proponas starigon de "Fondaĵo Jules Verstraeten por la Refreŝigo de la Domo". Ni informos la invititojn, ke la komisionanoj kolektas monon, kiun ni transdonos en la festo al Jules Verstraeten. Homoj povos donaci en likida mono al unu el la komisionanoj aŭ ĝiri tion al FEL. La lasta solvo precipe gravas por homoj, kiuj ŝatas ricevi ateston por la impostdeklaro.
Jacques Schram proponas, ke Jules Verstraeten mem estu la administranto de tiu ĉi monsumo. La celo ne estas konservi la kapitalon, sed elspezi ĝin tuj, kiam laboroj komenciĝos. La Verda Stelo planas ankoraŭ ĉijare repentri la kunvensalonon. Krome la fenestroj ĉe la antaŭa fasado urĝe refarbiĝu kaj la renovigo de la tegmenta zinko povus subite montriĝi necesa (jam en 1980 Ernest Lernout antaŭdiris la neceson de baldaŭa anstataŭigo).

Ĉiuj komisionanoj konsentas pri la faritaj proponoj.

Protokolis Ivo Durwael.

---

**Estraro, 94.07.21**

Okazinta la 21an de julio 1994 ĉe la prezidanto, Hertendreef 12, 2920 Kalmthout.

Ĉeestis: Wim De Smet, Roland Rotsaert, Ingrid Lievens, Johan Van Eenoo, Paul Peeraerts, direktoro de la Esperanto-Centro.
Pardonpetis: Jacques Schram.
Malĉeestis: Alex Humet.

La Prezidanto Wim De Smet malfermas la kunvenon je la 15.20 h. bonvenigante ĉiujn ĉeestantojn.

**Tagordo**

**1. Dua lego de** la raporto pri la estrarkunsido de 21.05.1994. La denove korektitan version Johan Van Eenoo kunsendos kun la raporto pri 21.07.1994.

**2. Raporto pri la** estrarkunsido de 24.06.1994. Korektitan version Johan Van Eenoo kunsendos kun la raporto pri 21.07.1994.

**3. Envenintaj korespondaĵoj**
a) Letero de Jacques Schram anoncante, ke Jacques Schram ne partoprenos en la kunsidoj de la FEL-estraro. Leviĝas la demando, ĉu anstataŭigi Jacques Schram per administranto el la provinco Antverpeno, aŭ lasi la situacion kiel ĝi estas.
La estraro decidas lasi la situacion kiel ĝi estas dum la resto de la laborjaro, akceptante, ke Jacques Schram ne partoprenos la kunsidojn, sed eviti tiajn situaciojn en la estonteco.
b) Informilo "La Hirundo".
c) Letero de la Esperanto-grupo de 's-Hertogenbosch pri eldonado de informbroŝuro pri Esperanto. La letero transdoniĝos al la Komisiono pri Informado.
ĉ) Letero de "Vlaams Blok" kun malfrua respondo al nia letero dissendita al la belgaj politikaj partioj pri la eŭropaj elektoj.

**4. Gravaj elspezoj de la venontaj monatoj**
a) Afrankmaŝino. Kvankam la aĉeto estas neevitebla, oni ankoraŭ atendas. Eble la prezoj malaltiĝos. La afrankmaŝino nepre aĉetiĝu tamen antaŭ la jarfino. Do en novembro 1994 ni devas havi ĝin laŭplane. Paul Peeraerts decidu pri kia maŝino.
b) La eldono de "ABC Gramatiko de Esperanto" (teoria parto) de E. Van Damme kaj Christiane De Vleminck fariĝu kiel eble baldaŭ.

**5. Aliĝoj de pliaj grupoj**
Dum antaŭaj jaroj estis en la administrantaro de FEL reprezentantoj de asocioj kiuj havas kun FEL iun konsenton pri kunlaboro, ekz. Bond Zonder Naam, Amnesty International, la fervojistoj, skoltoj, instruistoj, S.A.T. ktp. Wim De Smet konstatas, ke dum la lastaj jaroj tiaj reprezentantoj mankas en nia administrantaro.
Paul Peeraerts
1) ekzamenos pri kiuj el tiaj grupoj deziras kunlabori kun FEL;
2) verkos tekston petantan al tiuj grupoj pri plidaŭrigota kunlaboro kaj menciantan, ke, post pago de 600,- BEF, ili rajtas havi reprezentanton en la FEL-administrantaro.

**6. Sonorilo**
Paul Peeraerts eksplikas la estintecon kaj estantecon de la situacio pri Sonorilo. Li ankaŭ esploros, ĉu FEL jure havas rajton pri parto de la havaĵoj de Sonorilo, kaj ĉu ĝi eble povus repreni tiun parton?
Wim De Smet alvokos Grégoire Maertens, ke venu solvo al la problemo. Se tio ne efektiĝos antaŭ la jarfino de 1994 la estraro decidos kion entrepreni (inviti Gr. Maertens al iu posta estrarkunsido).

**7. Komisionoj**
a) Definitivigo de la regularo
La estraro decidas, ke la komisionoj devas havi decidrajton, kaj regulas tion jene: *"La komisionoj havas propran decidrajton ene de ilia taskaro. Sed ili ne rajtas plenumi ĝin antaŭ 20 tagoj se tiu havas implikon sur la financoj, la moraloj aŭ la prestiĝo de la movado. Raportoj devas alveni ĉe la estraroj antaŭ 10 tagoj post la kunveno de la komisiono. La estraranoj havas 10 tagojn por protesti ĉe la komisiito. Se ne alvenas ĉe la komisiito protesto antaŭ 10 tagoj, la komisiono rajtas plenumi sian decidon. Se alvenas protesto, la afero prokrastiĝos ĝis la venonta estrarkunveno."*
Wim De Smet verkos novan tekston.
b) Ne estas rimarkoj pri la raporto de la Financa Komisiono.
La Komisiono pri Membraro redaktos enketon kaj publikigos ĝin en Horizontaal.
La Komisiono pri Instruado ankoraŭ ne kompletiĝis. Johan Van Eenoo skribe invitis 5 personojn esti membro de la Komisiono pri Instruado. Neniu ĝis nun respondis. Ingrid Lievens, reveninte post vojaĝo, ankoraŭ ne povas doni definitivan respondon. Utilus eble havi iun de FLEJA en la Komisiono.

**8. Regularo pri estraro kaj administrantaro**
Mankas la tempo por tute priparoli la tekston. Wim De Smet konsilas, ke ĉiu estrarano atente relegas ĝin hejme antaŭ la sekvonta kunsido.

**9. Esperanto-centro de FEL**
El la diskuto pri la ambaŭflanka kunlaboro (kiun Wim De Smet nomas "simbiozo") inter FEL kaj la Esperanto-centro montriĝis, ke necesas bona komunikado inter la respondeculoj kaj de FEL kaj de la centro. Wim De Smet komencis verki tekston pri tio, kiun Paul Peeraerts kompletigos.

**10. Venonta estrarkunveno**
La venonta estrarkunveno okazos en la Esperanto-domo, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, la 13an de aŭgusto 1994 je la 15a h.

**11. Diversaĵoj**
a) Wim De Smet prenis sur sin paroli en Budapeŝto, okaze de la veninta Esperanto Festivalo, pri lingvaj problemoj en Belgio. Li ne necese parolis nome de FEL.
b) Antaŭvidante la "Vlaams-Europese 11-daagse" de 1995 FEL prezentos siajn servojn al Ministro-Prezidanto Vandenbrande kiel kultura ambasadoro por Flandrio.
c) Wim De Smet renkontis S-ron Philippon, kiu i.a. havigis al li fotokopion de letero far S-ro J. Happart, skabeno de la flandra vilaĝo Voeren. En sia letero S-ro Happart montras sin tre favora al Esperanto.
ĉ) La Kultura Konsilio de Kalmthout publike laŭdis la siavilaĝan grupon "La Erikejo" pro la honorado de E. Symoens (honormembro de U.E.A.).
d) Dum la borso "La Alia Libro", Jacques Schram prezentos la libroservon kaj la libraron de FEL. Ankaŭ uzeblas dum la venonta lernojaro reviziita perkoresponda kurso.
e) Wim De Smet indigniĝis pri la artikolo pri UNESCO en la lasta aperinta numero de Horizontaal. Estas laŭ li ridindige, ke la redaktoro fine de la tripaĝa artikolo atentigas la legantojn, ke ĝi estas blago.
f) Por la venonta numero de Vertikale Wim De Smet estos la redaktoro, krom se Paul Peeraerts trovos eble pli bonan solvon (ĉu Ivo Durwael?).

Raportis Johan Van Eenoo.

---

**Estraro, 94.08.13**

Okazinta sabaton la 13an de aŭgusto 1994 en la Esperanto-centro, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen je la 15a horo.

Ĉeestis: Wim De Smet, Johan Van Eenoo, Roland Rotsaert, Ingrid Lievens kaj Paul Peeraerts (invitita).
Pardonpetis: Alex Humet (ferias).

La prezidanto Wim De Smet malfermas la kunvenon je la 15.10 h. bonvenigante ĉiujn ĉeestantojn.

Aldoniĝas al la tagordo la du jenaj punktoj:
- instrubendo;
- eksiĝo de la kasisto (priparoliĝas je la fino de la kunveno).

**Tagordo**

**1. Atentigo pri kelkaj** korektaĵoj en la raporto pri la estrarkunsido de 24.06.1994.

**2. Johan Van Eenoo** dissendu la korektitan version de la raporto pri la estrarkunveno de 21.05.1994.
En la raporto pri 21.071994 li atentu pri la alfabeta sinsekvo de la literoj en Esperanto: a, b, c, ĉ, d, e, f, g, ĝ ktp.
La frazon en punkto 7a Wim De Smet iom alie vortigis en la teksto kiun li alportas al la nuna estrarkunsido.
Pliaj korektaĵoj kaj/aŭ rimarkoj: vidu en la korektita versio.

**3. Envenintaj korespondaĵoj**
1) Informilo por la venonta eldono de "Kiu estas kiu en scienco kaj tekniko". Publikigi alvokon en Horizontaal.
2) Urbo de Antverpeno petas delegiton de FEL en la Urba Kultura Konsilio. Ĉu komisiito?
3) Letero de Leo Tindemans reage al la teksto kiun FEL disigis okaze de la pasintaj eŭropaj elektoj, *"kiun mi povas subskribi"*. La estraro konsideras tiun reagon grava kaj ekzempla.
4) Letero de Maurice Wouters pri Esperanto (eŭropaj elektoj): al Wim De Smet.

**4.a) Propono pri propagandbroŝuro**
Envenis letero de Dukarbara Esperanto-Grupo el 's-Hertogenbosch (Nederlando) kun prov-teksto por nederlandlingva broŝuro pri Esperanto, kompletigonta la flandran broŝuron "Grenzeloos kommuniceren" per pli da informoj pri la lingvo.
La estraro estas ja favora al tiu projekto. Tro frue estas por respondi taŭge al la aliaj demandoj (statistikoj, kunlaboro flandra-nederlanda) en la letero. Tio priparoliĝos en venonta estrarkunsido.
**b) IEI vidbendkurso**
IEI planas la eldonon de vidbendkurso kaj petas al FEL antaŭmendi kelkajn ekzemplerojn. Antaŭmendi 11 bendojn kostas 20.000 fr-ojn kaj rajtigas al rabato.
La estraro decidas antaŭmendi 11 ekzemplerojn, pagi tiujn en decembro 1994, kaj informi la flandrajn membrogrupojn dum la administrantarkunveno en Stokkem (20.08.1994).

**5. Programo por volontuloj**
Wim De Smet kontaktis "Platform voor Voluntariaat", al kiu FEL aliĝis post la konsilo de la Komisiono pri Financoj (kunveno 24.06.94).
Decidiĝas organizi iun informposttagmezon por interesotoj en la Esperanto-Centro. Por tio:
1) publikiĝos komuniko en Horizontaal;

2) FEL kontaktos personojn kiuj reagos al 1), kaj personojn el la antverpena regiono pri kiuj ni scias, ke ili havos la tempon por volonti (pensiuloj, senlaboruloj, instruistoj).
Dato proponata: 19.10.1994 (ne certas, ĉu ĉeestos iu de "Platform voor Vrijwilligerswerk" (Platform voor Voluntariaat")).
Plej necese estas librotenisto kiu kiel volontulo ekzamenu la librotenadon de FEL.

**6. Kontaktoj kun gravuloj en i.a. eŭropa kaj flandra movado**
Wim De Smet opinias, ke FEL havu kontaktojn kun personoj, plej ofte ne-Esperantistoj, el la politika, kultura, socia aŭ financa mondo, kiuj povas esti utilaj kiel kontaktpunkto por disvastigi Esperanton. Oni apelaciu al la lokaj grupoj.

**7. Preparo de la administrantarkunsido (20a de aŭgusto, Stokkem)**
La jenaj frazoj ne estas decidoj de la estraro, sed estos priparolataj dum la administrantarkunsido en Stokkem (20.08.94):
* La deligitoj de la grupoj de Beringen, Genk, Hasselt - se ili venos - estos akceptataj kiel administrantoj.
* La grupoj de Peer kaj Zonhoven ĝis nun ne estas membroj de FEL, nek de la Limburga Ligo. Okaze, ke tiuj volas aliĝi al FEL, ili havigu al la estraro sian regularon. Paul Peeraerts telefonos al Peer kaj Zonhoven sciigante tion.
* La redaktoro de la revuo de FEL laŭstatute estas administranto (ekz. Guido Van Damme, redaktoro de Horizontaal). Krom Horizontaal ankaŭ Vertikale estas revuo de FEL. Ankaŭ ĝia redaktoro, Jorg Demulder, sekve estas administranto.
* Klarigo pri la regularo pri estraro kaj administrantaro.
* Redistribuado de la FEL-aliĝkotizo: FLEJA ricevu po 250 BF por FLEJA-membro, kaj la lokaj grupoj po 150 BF por membro. Kunlaborantaj grupoj (Skoltoj, Movado sen Nomo, Fervojistoj ktp) pagas 600 BF.
* La afero "Limburgo" (vidu supre).

**8. Regularo pri administrantaro kaj estraro**
Tiun regularon prilaboras du speciale komisiitaj estraranoj: Wim De Smet kaj Johan Van Eenoo.

**9. Komisionoj**
a) regularo
Wim De Smet kunportis tekstproponon. Mankas la tempo por pridiskuti ĝin surloke. Ĝin legu la estraranoj hejme kaj rimarkojn, aŭ almenaŭ aprobon sciigu al Wim De Smet antaŭ 01.09.1994. Se ne envenis rimarkoj antaŭ tiam la teksto estos konsiderata akceptita tiel de la tuta estraro.
b) agado
Komisiono pri Membraro: preparis enketon (Ingrid Lievens kunportis ĝin kaj raporton de la pasinta kunsido).
Komisiono pri E-domo: raporto ekzistas.
Komisiono pri Instruado: telefoni al R. Wylleman pri E-instruado en lernejoj.
Komisiono pri Financoj: planas sekvantan kunsidon.

**10. Programado por diversaj okazontaĵoj en septembro-decembro 1994**
- BEF-kunsido: la 15an de oktobro en Antverpeno.
- Prelego de Claude Piron ĉirkaŭ la 10a de oktobro: ne estas novaĵoj. Tamen ni restas pozitivaj. Wim De Smet daŭrigos la kontakton kaj regulos la aktivecon telefone.
- Fine de oktobro, certe antaŭ la 15a de novembro nomumo de S-ro Gr. Maertens kiel honormembro de FEL. Tio okazos en Bruĝo, en kombinado kun vizito al la Memling-ekspozicio antaŭ-, kaj serĉpromenado posttagmeze. Johan Van Eenoo kontaktos Gr. Maertens por fiksi taŭgan daton (ne je la Sanktulara Festo).

**11. Diversaĵoj**
1) FEL ricevis provizoran programon pri la Kongreso en Parizo je la Pentekosto 1995 kun demando ĉu FEL intencas partopreni per iu aktiveco. Laŭ estrara decido Paul Peeraerts respondis, ke FEL pretas organizi librostandon, sed ne ankoraŭ alvenis reago pri tiu propono. FEL ankaŭ pretas esti peranto kaj kiel peranto publici pri la Kongreso, kondiĉe ke ni ricevos 10% de la kongreskotizoj.
2) Wim De Smet, nome de la asocio "Nova Biologia Nomenklaturo", serĉante adjektivojn por nomendaj specioj, pro la financa apogo estinta de FEL, donas al la estraro de FEL la ŝancon elpensi tian adjektivon, aludantan al FEL aŭ la Esperanto-movado. La estraro akceptas "Felvebea" (konsistas el FEL (Flandra Esperanto-Ligo) kaj VEB (Vlaamse Esperanto-Bond)).
3) La problemon "Batos" pliklarigas Paul Peeraerts. Tiu temo metiĝas sur la tagordon de venonta estrarkunveno.
4) Apogo al Lieve Jacques: jam alvenis donacoj.
5) Kie troviĝu la arĥivoj de FEL? La estraranoj pripensu tiun demandon. Ĝi priparoliĝos dum la venonta kunsido.
6) La luprezo de la salono en Gento kie okazis la pasinta administrantarkunveno estis 2.500,- fr. La saldo de la organizaĵo estis 600,- fr. La progreso petas al FEL la repagon de tiu sumo. La estraro konsentas.
7) Pro la kompromiso pri la estrar- kaj administrantarregularoj (vd. 8) la eksiĝo de Roland Rotsaert ne plu estas akuta.

**12. Sekvonta kunveno**
La sekvonta estrarkunveno okazos en la Esperanto-Centro, Frankrijklei 140 en Antverpeno, dimanĉon la 18an de septembro je la 14.30 h.

Notulis Johan Van Eenoo.

---

**Estraro, 94.09.18**

Okazinta la 18an de septembro 1994 en la Esperanto-domo, Frankrijklei 140, 2000 Antverpeno.

Ĉeestis: Wim De Smet, Alex Humet, Roland Rotsaert, Ingrid Lievens, Johan Van Eenoo kaj Paul Peeraerts (invitita).
Ne ĉeestis: Jacques Schram, laŭ interkonsento.

La prezidanto Wim De Smet malfermas la kunsidon je la 14.30 h. bonvenigante la ĉeestantojn kaj gratulante ilin pro ilia ĝustatempeco.

Aldoniĝas al la tagordo la du jenaj punktoj: - tago de volontuloj;
- kursoj en Quellinstraat, Antverpeno (vd. punkto 11).

**Tagordo**

**1. La korektita raporto** pri la estrarkunveno de 21.07.1994 aprobiĝas. Raportis Johan Van Eenoo. Li de nun indiku sian telefonnumeron kaj la finiĝhoron de la kunveno.

**2. La raporto pri** la estrarkunveno de 13.08.1994 (raportis Johan Van Eenoo) aprobiĝas kun la jenaj rimarkoj:
- punkto 3.4: Letero de Maurice Wouters pri la eŭropaj elektoj.
- punkto 7: antaŭmeti: "La jenaj frazoj ne estas decidoj de la estraro, sed estos priparolataj dum la administrantarkunsido en Stokkem (20.08.1994)".
- punkto 7.5: Redistribuado de la FEL-aliĝkotizo: FLEJA ricevu po 250,- BF por FLEJA-membro kaj la lokaj grupoj po 150,- BF por membro. Kunlaborantaj grupoj (Skoltoj, Movado Sen Nomo, Fervojistoj ktp.) pagas 600 BF.
- punkto 10: BEF-kunsido la 10an de oktobro en la Esperanto-domo en Antverpeno.
- punkto 11.2: Wim De Smet nome de la asocio "Nova Biologia Nomenklaturo", serĉante adjektivojn por nomendaj specioj, pro la financa apogo estinta de FEL, donas al la estraro de FEL la ŝancon elpensi tian adjektivon, aludantan al FEL aŭ la Esperantomovado. La estraro akceptas "FELVEBEA" (konsistas el FEL (Flandra Esperanto-Ligo) kaj VEB (Vlaamse Esperanto-Bond)).
- punkto 11.6: ...kie okazis la pasinta administrantarkunveno... La progreso petas de FEL la repagon de tiu sumo. La estraro konsentas.

**3. La raporto pri** la administrantarkunsido de 20.08.1994 en Stokkem (raportis Ingrid Lievens) aprobiĝas. En la unua frazo de punkto 6: "FEL nur akceptas grupojn", forstrekiĝas "nur".
Ekestas diskuto pri la formulado de la unua el la du demandoj: "Ĉu oni devas aliĝi al LEL por esti membro de FEL aŭ ne?". Pri tiu demando la plimulto de la estraranoj opinias, ke la ekzistantaj regularoj (leĝo de 1921, statutoj kaj regularo pri interna ordo de FEL) estas sufiĉe klaraj.
Aliflanke ili interkonsentas pri la jena opinio: "La Limburga Esperanto-Ligo estas aparta aranĝo en la sino de FEL. Ĉiu el ĝiaj membrogrupoj rajtas je administran-

to(j) en FEL. Krome ĉiu alia grupo el Limburgo rajtas je administranto(j) se ĝi estas aliĝinta al FEL."

**4. Envenintaj korespondaĵoj**

1. APE (Association Pour l'Espéranto) invitas la FEL-estraron al sia jarkunsido en Charleroi (01.10.1994). Wim De Smet supozeble ĉeestos. Aliaj kandidatoj anonciĝu ĉe Wim De Smet.
2. La 15an de oktobro 1994 je la 13.30h.: jarkunveno de BEF (Belga Esperanto-Federacio) en la Esperanto-domo en Antverpeno (FEL gastigas!). Normale la estraranoj de FEL ĉeestas la jarkunvenon de BEF. Strange estas, ke la estraro de FEL ne scias kiu el siaj anoj estas vicprezidanto de BEF. Poste, samloke je la 16.30h.: prelego organizota de ILEI (letero de R. Wylleman): "Kiel reale funkcias Esperanto?" far S-ro Claude Gacond el La Chaux-de-Fonds (Svisio). La estraranoj transdonu tiun informadon al sia loka grupo.
3. Anonco kaj aliĝilo pri la Faulhaberren-kontiĝo en la feriejo Mennorode, Apeldoornseweg 185, Elspeet (Nederlando), 23-25.09.1194.
4. Anonco kaj aliĝilo pri la Trilanda Renkontiĝo de Comblain-au-Pont, Rue du Grand Pré 25 (Belgio), okazonta la 23an de oktobro 1994.
5. Anonco pri la eldono de multlingva vortaro komerca.
6. Informo pri la kunveno okazonta la 15an de oktobro de la laborgrupo por lingvaj problemoj en la Eŭropa Unio.
7. E. Symoens sciigas nin, ke la "Commissie voor Onderwijs van de Vlaamse Raad" pretas iun tagon (ankoraŭ ne konatan) aŭdi nin pri Esperanto (en) instruado. Krom E. Symoens pretas ĉeesti Paul Peeraerts, Alex Humet, Johan Van Eenoo, Wim De Smet kaj eble Ingrid Lievens.
8. 06-09.11.1994: nordfranca renkontiĝo en Haezebroeck (Francio).
9. Publika letero far Alex Humet al Jacques Schram (vd. punkto 11).
10. Letero de Dieter Batsleer responde al letero de Johan Van Eenoo: ĉeesti eksterlandajn kongresojn gravas por junaj komencantoj. Eble organizi kongreson en la Centro "Ryckevelde" apud Bruĝo? Transdonita al FLEJA.
11. Letero far Esperanto-simpatianto. Fotokopioj disdonitaj al la estraranoj por pripensado.

**5. Aliĝantaj grupoj**

La skolta grupo de Tienen pretas aliĝi al FEL. Tiun aliĝon la administrantaro aprobis en Stokkem. La skolta grupo de Tienen kiel kunlaboranta grupo rajtas je administranto (estos S-ro N. Boone). Paul Peeraerts skribos al Tienen por ke ili: 1) pagu la kotizon; 2) ensendu ĝian regularon.

**6. Honorigo G. Maertens**

La honorigo de G. Maertens okazos dimanĉon, la 6an de novembro 1994 en Bruĝo, kaj ankaŭ administrantarkunsido kaj Ĝenerala Membrokunsido. Roland Rotsaert kaj Johan Van Eenoo serĉu taŭgan salonon kun manĝebleco por 50 personoj uzotan posttagmeze (de la 2a ĝis la 6a). Al Roland Rotsaert la estraro konfidas ne blankan ĉekon, sed tamen larĝan financan permeson por lui tian salonon en Bruĝo. Tiuj, kiuj antaŭtagmeze deziras viziti la Memling-ekspozicion (sen rezervado, do ĉiu pagas sian propran enirtikedon), turnu sin al Johan Van Eenoo.

**7. Afero Batos**

La afero "Batos" jam tuŝiĝis pasintkunside. Nun la estraro klare decidas pri kion fari kun la sumo dedicita al la rumania vilaĝo Batos, sed restita en la kaso de FEL, kaj kiun, laŭ J. Vandenbergh, la vilaĝo Houthalen petas nin repagi. La estraro celas liberigi la famon de FEL de tiu "malmoralaĵo". Laŭ propono de Roland Rotsaert la estraro decidas, ke:

a) se Houthalen ankoraŭ havas pagendajn fakturojn pri Batos, FEL pagos tiujn per la "Batos-sumo";
b) se Houthalen mem pagis fakturojn pri Batos, FEL repagos tiujn sumojn al Houthalen per la "Batos-sumo" (necesas kopio de la fakturo kaj pagpruvilo);
c) Okaze de nek a) nek b), la sumo restos ĉe FEL en fondaĵo "Rumanio" kreota por apogi helpbezonajn rumanojn (Ĉu Esperantistojn?).

**8. Komisionoj**

La plimulto de la komisionoj ekfunkciis kaj jam kunvenis.

La <u>Komisiono pri Informado</u> kunmetiĝis: Wim De Smet, Ivo Durwael, Edward Symoens, Eddy Raets kaj Annie Bollaert.

La <u>Komisiono pri Instruado</u> ankoraŭ ne kunmetiĝis. Jorg Demulder sciigis al Johan Van Eenoo, ke li pretas aliĝi. La komisiono ekzamenu la instruadon de Esperanto en lernejoj.

En la <u>Komisiono pri Membraro</u> J.P. Allewaert rezignis kiel komisionano. Por eviti ĥaoson en la organizado de prelegoj far eksterlandaj vizitantoj en flandraj grupoj, Ingrid Lievens kunordigos tiujn prelegojn. Anonciĝas, ke la 7an de oktobro prezentos sin en Antverpeno du zairanoj kun muziko kaj kantoj.

<u>Komisiono pri Eldonaĵoj</u>. Laŭtlego de la raporto.

- punkto 3: La estraro unuanime akceptas la proponon de la komisiono, laŭ kiu "Venontjare certe aperos Monato, sed la estraro devas esplori la rolon de FEL en ĝia eldonado".
- punkto 4: La estraro unuanime akceptas la jam de Paul Peeraerts komunikitajn tarifojn por Monato.
- punkto 10: La estraro unuanime akceptas la proponon de la komisiono laŭ kiu *FEL (kaj siaj membroj) igas organizi sia(j)n vojaĝo(j)n de vojaĝoficejo.* Paul Peeraerts estas komisiita pliinformi pri la enhavo de la *"kwaliteitslabel"* de Vlaams Studie- en Documentatiecentrum voor VZW's.

**9. Financa stato**

a) La ĉiujara truo finseptembra (pro forkonsumado de la abonkotizoj de Monato) en la kaso de FEL ne okazos, ĉar ne estis grandaj investoj. Ankaŭ ne estos granda rezervo. El komparo inter la financa stato de 1993 kaj 1994 konkludiĝas, ke 1) la ero de enspezo rezulte de Monato falis; 2) ne okazis grandaj investoj.

b) Iniciate de La Verda Stelo ekstariĝis nova fonduso cele al la plibonigo de la Esperantodomo. En ĝi kolektiĝos donacoj de La verda Stelo (kiu jam donis 25.000 frankojn), de privatuloj, kaj... de FEL. Leviĝas 3 demandoj:
1) Ĉu la estraro aprobas la fonduson?
2) Se jes, ĉu FEL enmetos monon?
3) Kiu reprezentos FEL/Centron en la konsilo?

1) La estraro aprobas la fonduson. Ĉefe Johan Van Eenoo, sen malaprobo de la principo kaj la celo de la fonduso, protestas kontraŭ tio, ke "pro urĝo":
- fonduso, en kiu mono de FEL estas engaĝita, estas ekstarigita sen konsulti FEL kaj sen la scio de la FEL-estraro;
- La Verda Stelo petis la prezidanton de FEL fari regularon por la fonduso, tiel trovigante la FEL-estraranojn antaŭ jama faritaĵo.

Paul Peeraerts klarigas la ĝisnunan financadon de plibonigaj laboroj en la Esperanto-domo: La Verda Stelo pagas 1/4, FEL pagas 3/4.

2) Voĉdonado: Ĉu FEL enmetas monon en la fonduson?
- jes (1)
- jes, kondiĉe ke la sistemo 1/4-3/4 ne plu validos (Johan Van Eenoo)
- provizore ne (1)
- ne (2)

3) Voĉdonado:
- Ivo Durwael por FEL:
  3 favore, 2 sin detenas;
- Paul Peeraerts por la Centro:
  3 favore, 2 sin detenas.

**10. Eŭropa Kongreso en Parizo**

La kongreso okazos en Parizo dum la pentekosta semajnfino 1995 ((2)-3-4-5-(6)a de junio). FEL alvokos siajn membrojn aktive partopreni, sed ne vidas iun kapablan prizorgi eron de la distraĵoj, aŭ gastparoladon, prelegon ktp.

**11. Esperanto-kursoj**

1) Envenis komento kaj aldonoj pri kursoj organizitaj de FEL, i.a. la demando, ĉu ĉiuj kursoj en Flandrio estu egalprezaj? La estraro opinias, ke tion oni rekomendu sed ne postulu, ĉar estas tro da laŭgrupaj diferencoj inter samnivelaj kursoj (nivelo de la instruisto, nombro kaj kapablecoj de la gelernantoj, ebleco de la grupo finance apogi la kurson, jes aŭ ne senpaga salono ktp ktp).

2) Priparoliĝas la publika letero far Alex Humet al Jacques Schram pri Esperanto-kursoj en Antverpeno (urbo, Quellinstraat - La verda Stelo, Frankrijklei). Wim De Smet notigas, kaj la estraranoj agnoskas, ke la organizado de Esperanto-kursoj de la urba estraro (en urba lernejo, kun subvencioj, pagitaj instruistoj, kaj oficialaj diplomoj) kiel en Antverpeno, kaj jam dum 24 sinsekvaj jaroj, estas UNIKA afero en la Esperanto-mondo.

La estraro:
1. akceptas unuanime la jenan deklaron: "La estraro de la Flandra Esperanto-Ligo dum sia kunsido de 18.09.1994 priparolis la staton kiu estiĝis en Antverpeno rilate al la jam de 24 jaroj ekzistanta Esperanto-kurso de la urbo Antverpeno, kaj konstatis, ke en la nuna jaro la pluekzistado de tiuj kursoj estas endanĝerigata pro manko de lernantoj en la unua studjaro.
Tial la estraro:
1) rekomendas, ke ĉiuj administrantoj de FEL kaj ĉiuj estraranoj de La Verda Stelo insiste rekomendu al eblaj interesha-vantoj, ke ili enskribiĝu en la unua studjaro de tiu kurso;
2) malrekomendas, ke en Antverpeno mem en la sama periodo ekkomencu kursoj por komencantoj;
3) instigas, ke iniciatoj sur tiu kampo ne estu entreprenataj sen konsultado de la FEL-estraro aŭ de la FEL-Komisiono pri Instruado (JVE).
2. aprobas unuanime komuniki sian dekla- ron al la FEL-administrantoj de la regiono antverpena kaj al la estraranoj de La Verda Stelo.
Alex Humet foriras post la pritraktado de ero 11 de la tagordo.

**12. Estonteco de BEF**
Wim De Smet pliklarigas la ekeston, la estintecon kaj estantecon de BEF. La nuna situacio tute ne estas klara. La estonteco de BEF priparoliĝos dum la BEF-kunsido de la 15a de oktobro (vd. punkto 4.2).

**13. Kontribuo al Lieve Jacques**
Alvenis kelkaj kontribuoj.

**14. Venonta estrarkunsido**
La 15an de oktobro je la 9.30 h. en la Esperanto-domo, Frankrijklei 140, 2000 Antverpeno.
Post punkto 14 foriras Johan Van Eeno kaj Roland Rotsaert.

**15. Diversaĵoj**
UEA petis al FEL organizi ago-tagon pri Esperanto en la 8a de oktobro. Pro tio, ke ilia peto atingis nin nur en la 12a de septembro, la restantaj estraranoj ne vidas eblon por organizi ankoraŭ ion. Venontjare la estraro pli frue okupiĝu pri tio.

Wim De Smet estas nun denove kasisto de Instituut voor Europese Vorming. En tiu funkcio li eble povos fari ion por Esperanto.

Fino de la kunveno je la 20h00.

Protokolis ĝis ero 14 Johan Van Eenoo;
ero 15 kaj fino Paul Peeraerts.

---

**Komisiono pri Informado, 94.09.17**

La unua kunveno de la Komisiono pri Informado je la 17a de septembro, inter la 14.45 kaj 17.00 h en la Esperanto-centro.

Ĉeestis: Annie Bollaert, Wim De Smet, Ivo Durwael, Eddy Raets.
Senkulpigon petis: Edward Symoens.

**1. Bonvenigo kaj sinprezentado**
- Wim De Smet bonvenigas la membrojn per regalo.
- Sinprezento:
Annie Bollaert: laboras por la kanada registaro; laboras en la sekcio, kiu flegas la rilatojn kun la Eŭropa Unio; havas konstantan alireblecon en la Eŭropa Parlamento kun multaj kontakteblecoj.
Wim De Smet: kiel nova prezidanto de FEL provas enkonduki novajn metodojn en la laboroj de FEL, kio provokas kontraŭajn reagojn.
Ivo Durwael: volontulo en la Esperanto-centro; de '89 ĝis '92 estrarano de UEA pri informado.
Eddy Raets: sekciestro de administra servo ĉe Gazet van Antwerpen; kvankam la redakcio estas sendependa, li povas - per personaj rilatoj - akiri favorojn de la redaktoroj.
Edward Symoens: en la lastaj jaroj okupiĝis precipe pri la eŭropa kampanjo (kune kun Erasmus kaj Maertens), pri instruaferoj (ILEI), havas multajn kontaktojn kun respondeculoj en kaj ekster la Esperanto-movado kaj okupiĝas en ILEI pri informado.

**2. Signifo kaj funkciado de la komisiono**
Wim De Smet prilumas la regularon de la komisionoj. Li invitas hodiaŭ limiĝi al orientiĝo kaj pripalpado de la temo, sen





diskutoj pri la metodoj nek pri praktikaj planoj.

**3. Nuntempaj E-propagandiloj en Flandrio kaj aliloke**
Ivo Durwael faris ekspozicion de la materialo, kiu disponeblas en la centro. Krom en la nederlanda ekzistas iom da materialo en la angla, franca, hispana, germana kaj dana.
Wim De Smet speciale atentigas pri faldfolio, projektita de Will Green ("Wij kunnen het..."), pri plurkolora faldfolio de GEA kaj pri faldfolio de La Progreso. Evidentiĝas, ke la gazetaraj dosieroj de FEL necesas aktualigon.
Annie Bollaert montras interesan broŝuron de SP, kiu montras klarigon ĉe ĉiu litero de la alfabeto. Krome ŝi kunportis faldfoliojn de la Kanada Ambasado.
Wim De Smet opinias, ke la teksto de Piron pri la lingva problemo en Eŭropo plue uzeblas.
Konkludo: ni orientiĝis pri eble nekonataj eblecoj.

**4. Kiu konas kiun?**
Wim De Smet skizas la celon kaj gravecon de tiu ĉi enketo.

**5. Dokumentado**
Ivo Durwael informas, ke la laboro por la informa biblioteko kaj por dokumentado haltis dum jaroj. Necesos volontulo, kiu kompetentas kaj disponas pri libera tempo.

**6. Analizo de jam uzitaj metodoj**
Wim De Smet emfazas la neceson de pritaksado, analizado kaj aktualigo de jam tradiciaj agadoj.
Por celkonscie labori necesas dediĉi atenton al la celo, la metodo, la enhavo de niaj mesaĝoj, la celgrupo, la informanto/isto kaj la investo de mono kaj tempo. Tio okazu paŝon post paŝo en la venontaj kunsidoj.
Eddy Raets konsilas serĉi la ligon inter niaj ideoj kaj la publiko. Ni aperu eksteren en multe pli vasta kadro ol ni ĝis nun faris. Niaj ĝisnunaj rimedoj ne sufiĉas.
Wim De Smet proponas limiĝi al la listigo de la jam konataj rimedoj. Ĉiu indikas sian preferon. Jen la listo, kun aldono de la nombro da preferoj de la ĉeestantaj komisionanoj:
- Horizontaal (4)
- Rebatado (1)
- Skribado al gazetoj
- Pagita publikigado
- Informoj pri Esperanto-grupoj en la komunikiloj
- Planita opiniformado (serĉi apogon ĉe influhavaj personoj) (2)
- Intervjuoj en la komunikiloj
- Librostandoj (1)
- Esperanto-libroj en vendejoj
- Kongresoj kaj kunvenoj
- Disdoni flugfoliojn (4)
- Informi pri kursoj (1)
- Esperanto-libroj en bibliotekoj
- Esperanto-domo (3)
- Specialaj eventoj
- Gazetaraj komunikoj (3)
- Informa budo surstrata
- Vestaĵoj kaj ornamaĵoj (2)
- Publikaĵoj nacilingvaj
- Komputila reto
- Komputila inform- kaj studprogramo
- Regula dissendado de informoj pri aktualaĵoj pri Esperanto
- Centra artikolo lokita (kp UEA-kampanjo) (2)
Noto: Wim De Smet demandis al ni nur indiki la 5 ĉefajn informmetodojn. Manko de cifero ne indikas, ke tio estas neglektinda por la komisionanoj. Wim De Smet invitas plu pensi pri uzeblaj metodoj kaj ilia valoro.

**7. Diversaĵoj**
- Herman Deceuninck proponas kontakti "De Groene Waterman".
- Wim De Smet voĉlegas inviton de UEA por agadi en la ago-tago (09/10). Tro malfrue.
- Wim De Smet instigas al partopreno de prelego Gacond (15/10).
- Ĉu FEL menciiĝu inter la projektoj de "Hefboomaktie" (Min. Edukado - por mezlernejanoj)? Mankas informoj.
- Malfermiĝos biblioteko por ŝipistoj. Konsilo: donaci du lernolibrojn por memstudado.
- Kvinpetalo (F) organizas staĝon pri informado. Ege konsilinda. Ĉu iam inviti Picasso por staĝo en Belgio?
- Mazi en Gondolando (vidbenda Esperanto-kurso). FEL antaŭmendis 11 ekz.

**8. Venontaj kunsidoj kaj pritraktotaj temoj.**
Wim De Smet telefone invitos la anojn kaj kunmetos tagordon.

Fino de la kunveno: 17.00 h.

Protokolis Ivo Durwael.

---

**Estraro, 94.10.15**

Okazinta la 15an de oktobro 1994 en la Esperanto-Centro, Frankrijklei 140, 2000 Antverpeno.

Ĉeestis: Wim De Smet, Alex Humet (envenis dum punkto 3), Ingrid Lievens, Johan Van Eenoo, Ivo Durwael (anstataŭas Paul Peeraerts).
Pardonpetis: Roland Rotsaert kaj Paul Peeraerts (invitita).
Ne ĉeestis: Jacques Schram, laŭ interkonsento.

La prezidanto Wim De Smet malfermas la kunsidon je la 10.10 horo, bonvenigante la ĉeestantojn, kaj antentigante ilin pri la kunsidtempo limigita. Laŭ lia kalkulo ni disponas pri ĉ. po 7 minutoj por tagordero.

**Tagordo**

**1. La raporto pri** la antaŭa estrarkunsido reskribiĝu laŭ la rimarkoj de la ĉeestantoj.

**2. Envenintaj korespondaĵoj**
a) Letero de Ivo Durwael pri la ĉina ekspozicio. FEL okazigu.
b) Vlaams Studie- en Documentatiecentrum invitas la estraron al info-vespero en Wevelgem pri la kvalitsiglo pri neprofitcela entreprena gvidado la 7an de novembro. Eble Paul Peeraerts kaj Roland Rotsaert ĉeestos, Wim De Smet kondiĉe, ke FEL pagas la kostojn.
c) La Vlaamse Culturele Koepel vzw prezentas sin al FEL. Ĉu ĝi estas jes aŭ ne politika asocio? Wim De Smet informiĝos.
ĉ) Esperantokursoj en Antverpeno (letero de Jacques Schram). La afero solviĝos sed ne priparoliĝos dum la kunsido.

**3. APE kaj BEF**
Wim De Smet ĉeestis la pasintan kunsidon de APE kaj nomas ĝin "ĥaosan" kaj "plorigan". La FEL-estraro sin demandas, ĉu BEF iros la saman vojon?
Wim De Smet komunikas sugeston de S-ro Sossois organizi kunsidon pri la estonteco de BEF. La tri sugestitaj reprezentantoj nome de FEL kaj BEF estas Wim De Smet, Roland Rotsaert (akceptis) kaj Paul Peeraerts. Dum la samtaga posttagmeza kunsido de BEF la aliaj estraranoj de FEL rajtas mem kandidatiĝi.

**4. Tago de la volontuloj (19.10.1994)**
La intereso estis negranda. Ĉeestis i.a. Leontien Janssens, Ivo Durwael, Ingrid Lievens.

**5. Tago en Bruĝo: 06.11.1994**
Johan Van Eenoo komunikas la argumentojn de la bruĝaj organizantoj (Roland Rotsaert, Johan Van Eenoo, Oliva Van Eeghem) pri malfrua invitado, hasta organizado kaj neeblaj distraĵoj pro tempomanko, kaj la ilian sugeston prokrasti la honorigon de Grégoire Maertens al februaro-marto 1995. Wim De Smet konsideras la aferon decidita (vd. raporton pri kunsido 94.09.18). La bruĝa grupo estas nur petata inviti siajn membrojn. Se tiuj deziras, ili povas fari donacon al Grégoire Maertens. Iu el la estraro de Paco kaj Justeco alparolu (ĉu F. Roose?).
Programo:
10.00h - Gvidata vizito al la Memling-ekspozicio, prefereble en Esperanto (ekz. F. Roose).
12.00h - Tagmezmanĝo kaj agrabla kunestado en restoracio "'t Putje", apud 't Zand en Bruĝo.
14.00h - Administrantarkunsido.
15.00h - Ĝenerala membrokunsido.
16.00h - Honorigo Grégoire Maertens.
Donaco: libro al Grégoire Maertens, kia?
Floroj al la edzino de Grégoire Maertens.
Ornamo: Esperantoflago en la salono.
Inviton prizorgos Wim De Smet (invitiĝos S-ro Wells, Linz, Inst. Hodler).

**6. Regularo pri la administrantaro**
Johan Van Eenoo eksplikas la punktojn pri kiuj Wim De Smet faris rimarkojn. La eksplikoj estas akceptataj kaj la regularo aprobiĝas.





**7. La kunvenoj de la membraro kaj de la administrantaro okazos dum la Esperanto-tago en Bruĝo.**

**8. Komisionoj**
a) Informado: konsilas, ke FEL donacu kelkajn lernolibrojn kaj gvidkurson al la biblioteko de la maristoj. Alex Humet sugestas fari tion publike kun ĵurnalisto.
b) Instruado: la komisiono devas kunsidi. Ankaŭ Alex Humet kaj S-ro R. Wylleman akceptas membriĝi.

**9. Financa stato ne** estas en danĝero. La Flandra Komunumo elpagis sian subvencion; la sumo estas sufiĉe granda.

**10. Partopreno en borsoj**
Eble FEL partoprenos en la Verda Borso en Bruselo. Ĉu tio estos al FEL profita? Ĉu tiu partopreno estas politike neŭtrala? La afero revenos poste.

**11. Neŭtraleco de FEL**
Prokrastita.

**12. Afero Batos**
S-ro Vandenbergh konfirmas, ke la sumo (88.000,- fr.) estu repagita. Tamen necesas pli da detaloj antaŭ ol la estraro konsentas pri tiu repago.

**13. Rilatoj kun gravuloj**
Prokrastita.

**14. Ĉina ekspozicio**
Okazos en Ostendo kaj poste en Antverpeno. Ĉu tria grupo (Bruĝo, Gento?) organizos? Necesas klaraj kontraktoj. La financa respondeco restos ĉe la grupo organizonta.

**15. Fondaĵo Verstraeten**
Kiuj estos la reprezentantoj de FEL en la Fondaĵo Verstraeten? Laŭ propono de Ivo Durwael la estraro decidas reprezentiĝi per Wim De Smet kaj Ivo Durwael. Paul Peeraerts estos la ekzekutanto de la decidoj.

16 ĝis 20 priparoliĝos poste.
La estrarkunveno estas interrompita je la 12.10h kaj repreniĝas dum la paŭzo de la preleĝo far S-ro Gacond (ĉa 17.00h).

**11. Neŭtraleco de FEL**
Envenis letero pri la neŭtraleco de FEL. La estraro decidas, ke Wim De Smet publikigos en Horizontaal tekston pri tiu temo. Neŭtraleco ne estas pluralismo. Kie troviĝas la limo?

**16. Vertikale**
- Jorg De Mulder retiriĝis kiel redaktoro de Vertikale.
- 15 respondoj al la enketo de la Komisiono pri Revuoj envenis. Redisdonigi enketilojn la 6an de novembro en Bruĝo.
- Leviĝas la demando, ĉu Vertikale kaj Horizontaal kuniĝu?

**13. Rilatoj kun gravuloj**
Organiziĝos enketo. Wim De Smet sendos la tekston de sia alparolado en Hungario.

**17. Kunlaborprojektoj kun orienta Eŭropo**
La Flandra Komunumo, kiel aliaj okcidentaj nacioj, interesiĝas pri orienta Eŭropo kaj deziras ekigi projektojn tie. Ankaŭ FEL povus kunlabori, ekz. per la plurlingva vortaro de Vogelmann. FEL kontaktos la Zamenhof-centron en Bjalistok, la Turist-centron en Bidgoĉ, St.-Petersburg kaj Talin.

**18. UN-datreveno**
Pro la 50a datreveno de la UN la Flandra Komunumo planas aljuĝi premiojn. La estraro pensas pri la FEL-programo, kaj libron "50 jara UN kaj Esperanto". Ekzekutiĝu antaŭ 15.10.1995.

**19. Venonta estrarkunsido**
20.11.1994 je la 14.30h en la Esperanto-centro, Frankrijklei 140, 2000 Antverpeno.

**20. Diversaĵoj**
a) Fondaĵo Lieve Jacques. Kio okazas profite de Lieve Jacques?
b) Ankoraŭ ne indikiĝis reprezentanto de FEL en la Antverpena Kultura Konsilo.

La reprenita kunsido finiĝas je la 17.30h.

Raportis Johan Van Eenoo.

---

## Alvoko pri la Prezidantelektoj de FEL.

Baldaŭ okazos membrokunveno kun elekto de la prezidanto de FEL. Evidente ekzistas diversaj ideoj pri la rolo de ĝiaj prezidanto kaj estraro.

Kiam mi estis prezidanto de FEL, mi kredis je la centraliza rolo de la estraro kaj de la Esperanto-centro: ideoj kaj iniciatoj deiru de la estraro al la aktivuloj, do en vertikala strukturo.

Intertempe, miaj ideoj funde ŝanĝiĝis. Nuntempe mi pli fidas je horizontala strukturo: la aktivuloj en nia movado mem kiel eble plej multe respondecu pri la tasko, kiun ili entreprenis. Tio ne signifas, ke ĉiu restu izolita en sia netuŝebla ebura turo. En horizontala strukturo, oni daŭre subtenu unu la alian. Esprimoj, kiel "tio ne estas mia tasko", "ne metu nazon en mian vazon", akraj riproĉoj pri taskoj, kiujn faris aliaj, estas evitendaj. Necesas reciproka fido kaj respekto kaj emo por subteni unu la alian.

Tial necesas harmoniigi la agadojn, sed surbaze de la praktikaj spertoj de niaj plej sukcesuloj: kiel ili agadis kaj ĉu eblas dedukti kelkajn ĝeneralajn agadliniojn?

Mi pensas do, ke la rolo de la estraro kaj de la Esperanto-centro limiĝu al la subtenado de la aktivuloj nur tiam, kiam ili signalas helpobezonon. La estraro krome intervenu, kiam montriĝas aŭ anonciĝas konfliktoj.

En la ĉiutaga vivo oni spertas pli kaj pli kompleksajn strukturojn. En sia libera tempo, personoj kiuj volas ekaktivi en kultura societo supozeble volas eskapi el tiu formala etoso, kiu baziĝas sur ĝenerala malfido, por agadi en grupo de homoj bonintencaj kaj fidindaj, kun minimumo da strukturoj kaj reguloj. Tial mi defendas la supran opinion.

Mi ne teoriumas, ĉar la principoj, kiujn mi skizis ĉi supre vivas kaj bonefikas en la estraro de La Verda Stelo. Mi ankaŭ spertis iliajn rezultojn en alia organizaĵo.

Mi ŝatus kontribui al la realigo de tiuj ĉi ideoj en FEL. Tial mi estas kandidato por la prezidanteco de nia asocio. Mi konscias, ke nek miaj ideoj, nek mia persono, nek mia kompetento estos konvinkaj por ĉiuj membroj. Tial mi alvokas ĉiujn membrojn, kiuj sentas sin forte ligitaj al la bonfarto de FEL por prezenti sin kiel kandidato por la prezidanteco: nur kiam estos pluraj kandidatoj, la membroj havos la eblecon por vere esprimi sian preferon pri la estonta agadstilo de nia ligo.

Ivo Durwael.

**La Ĝenerala Kunveno okazos la 11an de marto en la Esperanto-centro.**